La angla? Neniel

Germana lernanto, kiu malbone posedas la germanan, ofte malsukcesas ankaŭ en anglalingvaj ekzamenoj. Lastatempa studo pri la lingvolernado montras grandan atingodeficiton. Ĝi montras ankaŭ malfortojn de la instrua sistemo. Foje la lernantoj ne povas enŝovi eĉ unu propran vorton, dum la instruisto parolas duoble pli multe, ol ĉiuj lernantoj kune.

Rilate al la angla kiel gimnazia studobjekto, ekzistas “tre signifa atingopinto” konsistanta el la lernantoj en la supraj 10-15%, kiuj parolas la anglan senpene kaj bonege. Ili sukcesas atingi multe pli altajn rezultojn, ol la sistemo atendas de ili. Aliflanke, nur unu triono de la lernantoj en la publikaj lernejoj kaj la integritaj komunaj lernejoj atingas la lernonormojn. Jen unu el la rezultoj de la studo “Deutsch Englisch Schuelerleistungen International” (Desi) raportitaj en Die Welt.

Lernantoj, kiuj nebone lernas la germanan kiel lernejan studobjekton, ne pli bone fartas en la angla. Ilia kono de la germana rekte efikas sur ilian sukceson en la lernado de la angla: la lernantoj, kies gepatroj ne parolas germane, atingas la plej malaltajn sukcesnivelojn, dum la infanoj, kiuj kreskis en plurlingva medio, atingas signife pli bonajn nivelojn.

Jen unuafoje formala studo trafis demonstri, ke tiuj, kiuj jam lernis la germanan kiel fremdan lingvon, pli facile ol la kamaradoj lernas la anglan poste. Ilian atingopluson oni taksis kiel “ŝparon de almenaŭ duonjaro da lernejado”, diras la kleruloj en la Deutsche Institut fuer Internationale Paedagogische Forschung surbaze de studo komisiita de kulturministra konferenco. Por tiu superrigarda studo, oni pridemandis kaj testis 11000 lernantojn je la komenco kaj la fino de ilia naŭa lernojaro.

Ilia studo konfirmas esplorrezulton trovitan en la universitato Basel, kie la lingvisto Georges Luedi konstatis, ke tiuj, kiuj lernis duan lingvon frue en la lernejado ankaŭ profitas en sia plulernado de la gepatra lingvo. La infanoj komencas ekzemple demandi sin, kial la germana havas tiom da artikoloj kaj la angla nur unu, kaj tio nutras ilian lernadon.

Tial, en Baden-Wuerttemberg, ekde 2003, la infanoj diradas “Good morning” al siaj instruistoj ekde la unua lerneja tago, kaj la instruistoj disdonadas atingopremiojn. Eĉ la infanĝardenoj en la internaciaj lernejoj instruas la fremdajn lingvojn; sonbendoj kiel “Englisch lernen mit Benjamin Bluemchen” por la infanoj inter la aĝoj de tri kaj ses substrekas ĉi tiun modon.

Kiam la kuko parolas, la kukeroj silentas

Dum leciono, tamen, la lernantoj kutime restas silentaj. En la anglalingvaj kursejoj, ofte okazas, ke la instruisto estas la ĉefa parolanto. La Tagesspiegel raportas, ke la instruistoj observitaj enkadre de la studo Desi parolas duoble tiom, kiom la tuto de ĉiuj lernantoj. La lernantoj respondas en tri sekundoj la plimulton de la demandoj, kiujn la instruisto starigas al ili. La instruistoj malofte pretas doni al ili pli da tempo por formuli la respondojn. Sed la studo Desi montras, ke la lernantoj sukcesas pli, kiam la lernantoj

ekpovas pli longe paroli dum la lingvaj lecionoj – kiam la instruisto pretas atendi pli longe la reagojn de la lernantoj.

Ĉu komenci instrui la anglan jam en la elementa lernejo? Tiun vojon malpreferas edukteoriisto Elsbeth Stern ĉe Max-Planck-Instituto por la Esploroj pri la Eduko en Berlino. “Niaj lernejoj estas tiel grandaj konstruejoj, ke ni ne povas permesi al ni la lukson establi novan fakon sen unue ellabori la pedagogion aŭ esplori la efikojn de tio, kion oni proponas”, ŝi diris al la semajngazeto Die Zeit.

Stern rekomendas, ke la elementaj lernejoj faru iom da konkreta analizo de la kostoj kaj avantaĝoj de la ĝisnunaj praktikoj, ĉar ankoraŭ ne ekzistas serioza kompreno pri la ĝusta vojo por funkciigi fremdlingvo-instruajn programojn por tiom junaj lernantoj. Stern prezentas la aferon ĉi tiel: “La infanoj nepre lernas kelkon da fremdaj vortoj. Kiamaniere helpas ilin atingi pli ol tion, se la lerneja instruisto kantas kun ili anglan kanton unu-dufoje semajne kaj poste diras ‘The weather is fine, now we go outside’?”

Ankaŭ ĉe la germana kiel lerneja studobjekto, preskaŭ duono de la lernantoj en la publikaj lernejoj kaj integritaj komunaj lernejoj malbone poentas ĉe tiaj taskoj, kiel la skribado de leteroj kaj la identigado de elementaj gramatikaj eraroj, diras Die Welt, surbaze de la studo Desi.

Fine de la naŭa lernojaro, nur triono de la lernantoj atingas la kapablon konscie uzi la gramatikajn konceptojn kaj verki preskaŭ senerarajn tekstojn en normala stilo. La studo konstatas, ke ĝuste je tiu aĝo la kapablokresko atingas signifajn nivelojn. Unu konstato estas, ke la knabinoj en la naŭa lernojaro atingas pli da sukceso, ol la samaĝaj knaboj.

Origina versio en la germana: http://www.spiegel.de/unispiegel/schule/0,1518,403855,00.html
Tradukis Probal Dasgupta